# ESPERANTO-SERVO

AKTUALA INFORMA BULTENO DE PRAHA

SPECIALA ELDONO — DECEMBRO 1949


*Paul Reimann:*

## JOSIF VISARIONOVIĈ STALIN, LA PLEJ BONA AMIKO DE LA ĈEĤOSLOVAKA POPOLO

La ĉeĥoslovaka popolo havas multajn rememorojn pri la momentoj, kiam Josif Visarionoviĉ Stalin sin intermetis aparte signife en ĝian vivon. Ĝi rememoras sekve tiom pli ĝoje lian sepdekan naskiĝotagon la 21-an de decembro 1949. Li intermetis sin trifoje speciale profunde en la ĉeĥoslovakan vivon. En la epoko de batalo de la ĉeĥa popolo por nacia memstareco li montris, kiel solvi la ĉeĥan naciecan problemon, — en la tempo de konstruado de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio li sin intermetis grave en la proceden de la bolŝevika partio, kaj en la dua mondmilito li intermetis sin por liberigi Ĉeĥoslovakion, kaj li montris al ni la antaŭenvojon.

J. V. Stalin, la plej bona amiko de la ĉeĥoslovaka popolo, granda teoriisto de la marksismo, kiu montradis al la internacia laborista klaso la vojon al liberiĝo, la vojon al socialismo, dediĉis ja dum la tuta tempo de sia politika aktiveco atenton al la demando pri nacie liberiga movado kaj tial do ankaŭ al la batalo de la ĉeĥoslovaka laborista klaso por la socialismo. Resumante la historian evoluon de niaj nacioj dum la lastaj kvardek jaroj tiom riĉaj je gravaj historioplenaj eventoj — oni konstatas, ke en ĉiu decida momento, en ĉiu signifa aliorientiĝo de la historia evoluo, Stalin montris pluan vojon de batalo.

Stalin okupis sin intense pri la ĉeĥa nacieca demando, je la unua fojo, preparante sian klasikan libron „*Marksismo kaj la nacieca demando*", verkitan en la j. 1913a post detala analizo de la nacieca situacio en Aŭstrio-Hungario kaj de la aŭstria politiko, inkluzive la ĉeĥan socialdemokration. En tiu tempo de grava akriĝo de la imperiismaj malkonsentoj, kiam la cirkonstancoj estis celantaj al la unua mondmilito, la sekvanta demando estis metita al la ĉeĥa popolo: kiu gvidos, ĉe okazo de profunda historia renverso, la nacie-liberigan movadon: ĉu la ĉeĥaj burĝaro aŭ la laborista klaso, gvidata tiam de la reformisma socialdemokratio.

El la analizo pri la karaktero de la ĉeĥa nacia movado, el la analizo, kiun Stalin faris en sia verko, instruo fontis por la ĉeĥa laborista klaso, ke ĝi devas apliki en la nacieca problemo sian memstaran vidopunkton, ke ĝi devas ne lasi la solvon de la nacieca demando al la ĉeĥa burĝaro.

La ĉefa kulpo, ke la aŭstria socialdemokratio ekiris en la nacieca problemo la vojon de la burĝa naciismo, apartenis kompreneble al la gvidantoj de la aŭstria socialdemokratio. Stalin malkaŝis do en sia verko unuavice la naciisman karakteron de la teorioj de l'socialdemokratoj Renner kaj Bauer pri kultura aŭtonomio. Sed Stalin ne limigis sian kritikon nur je la germana parto de la aŭstria laborista movado.

Li elpaŝis ankaŭ kun akra kritiko pri politiko de la gvidantaro de l'ĉeĥa burĝa demokratio. La ĉeĥa socialdemokratio, gvidata de reformistoj, ne bazis sin en sia batalo kontraŭ la nacieca politiko de la aŭstria sociala demokratio sur la principoj de la proleta internacio, ne pledis por la principo de nacia memdestino, sed cedis al influo de la ĉeĥa burĝa naciismo. El tio rezultis, ke dum la unua mondmilito, kiam kreiĝis kondiĉoj por ŝtata memstareco de Ĉeĥoslovakio, la ĉeĥa burĝaro povis plu teni sian hegemonion en la nacia movado kontraŭ Aŭstrio-Hungario. La politiko de la ĉeĥa socialdemokratio, kiu submetis sin al burĝa naciismo, kaŭzis, ke la stariĝo de memstara ĉeĥoslovaka respubliko en la j. 1918 ne fariĝis elirpunkto de batalo por socialismo — kiel la laborista klaso atendis —, sed ke la reakcia ĉeĥa burĝaro superregis la respublikon. Sub la lumo de la plua historia evoluo, ĝusteco de la kritiko pri la aŭstria kaj ĉeĥa socialdemokratioj estas aprobata. Sole la bolŝevika partio kaj Stalin persone montradis al la ĉeĥa laborula popolo, jam antaŭ la unua mondmilito, la ĝustan vojon kontraŭ nacia kaj sociala subpremo fare de la aŭstria-hungara imperio.

En la tempo, kiam la imperiisma reakcio kun la ĉeĥoslovaka burĝaro estas preparanta kontraŭsovetan elpaŝon de la ĉeĥoslovakaj legioj, Stalin persone sin intermetis por forturni konflikton de la legioj kun la soveta registaro. Dokumentoj, montritaj en la Ekspozicio de la Historio de l'Revolucia Movado, aranĝita en Praha, atestas nerefuteble la amikan sintenon de la soveta registaro rilate al la legioj kaj malkaŝas la fian perfidon de la ĉeĥa burĝaro kontraŭ la interesoj de la ĉeĥoslovaka popolo.

Josif Visarionoviĉ Stalin helpis ankaŭ la konstruadon de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, helpis la bolŝevikiĝon de tiu ĉi partio, montris la vojon, kiel superi ĉiun socialdemokratan malnovaĵon. La transiro al portempa stabiliĝo de la kapitalismo en la jaroj 1924 ĝis 1925 elvokis likvidemon en certaj rondoj de la komunistpartiaj funkciuloj, kiuj ne rezignis pri sia socialdemokrata pasinteco. La Komunista Partio de ĈSR travivas sian unuan internepartian krizon. Estas Stalin, kiu sin intermetis, en la kvina plenkunsido de l'Plenumkomitato de la Komunista Internacio, en la traktadon pri la ĉeĥoslovaka problemo, konvinkante la hezitemulojn kaj savante tiel la unuecon de la partio. En sia multsignifa parolado, kiu ludis historian rolon en la batalo por la bolŝevikiĝo de la partio, Stalin malkovris la radikojn de la oportunisma danĝero inter la membraro de la Ĉs. Komunista Partio kaj montris la vojon, kiel ĝin superi. Stalin helpis tiel la ĉeĥoslovakan popolon en ĝia strebado al nacia libero kaj socialismo.



*J. V. STALIN,*
*la ŝirmanto de la tutmonda paco.*

*Konstantin Biebl:*

### FOR LA TIMON!

*Min antaŭ nelonge altiris*
*volumo sensacia.*
*„La Nordo kontraŭ la Sudo"*
*ne estis titolo ĝia.*

*Verkis ĝin H. G. Wells.*
*Ĉu eble pravon li havas?*
*Ne, li malpravas!*

*Ne volas li fari panikon,*
*sed diras li tre konvinkite,*
*ke baldaŭ la tuta homaro*
*pereos subite.*

*Plej baldaŭ nepre devas perei la socio —*
*li skribas en la verk' Bankroto de Prudento.*
*Postrestos sole signoj de la lapona gento,*
*paŝsignoj en la neĝo; kaj eble eĉ ne tio . . .*

*Ĝis tiu temp' ne mankas multe,*
*ke de l' poluso al poluso*
*hom' homon serĉos*
*senrezulte.*

*Ekzistas iometa ŝanco sava*
*(la sanktularo estu atestantoj!)*
*por papuana tribo perukhava*
*aŭ la Krani-ĉasantoj.*

*Postrestos sole Buŝmanoj subarbedare.*
*Eĉ tion oni ne scias*
*ankoraŭ klare.*

*En Universo do okazas io.*
*Mankas parte prudento,*
*kaj parte religio.*

*Jen kion diras H. G. Wells.*
*Ĉu do pravon li havas?*
*Ne, li malpravas!*

*Kiel ja estus kredebla*
*baldaŭa pereo homara?*
*Male: sub via gvidado*
*vivos la mondo feliĉe.*
*Stalin, vi nia plej kara!*
*Malfidon pri la homaro*
*rifuzas ja ĉiu el ni.*
*Ĉiu, kun vi kiu kune*
*kredas je l'klaso proleta*
*kaj je ties grandegaj*
*kreemo kaj energi'.*

*Ĉiu amik' de Soveta Uni'!*

*Tradukis Miloš Lukáš.*

En la tempo de la hitler-faŝisma danĝero por Ĉeĥoslovaka Respubliko estas nur kaj sole Soveta Unio, estrata de Stalin, kiu donas helpon al la ĉeĥoslovaka popolo en ĝia malfacila batalo por defendi la nacian ekziston. Estas Soveta Unio kaj Stalin, kiuj helpeme etendas la manon al ĈSR kaj kiuj fine, kiam la senkuraĝa kapitalisma politiko de la ĉeĥa burĝaro kaŭzis perdon de la nacia kaj ŝtata memstareco de Ĉeĥoslovaka Respubliko, liberigas la Respublikon en 1945 kaj donas eblecon al nia popolo komenci konstruadon de socialisma socio.

*Zdeněk Fierlinger,*
*Vicprezidanto de la Ĉeĥoslovaka Registaro:*

## PRI LA SIGNIFO DE LA ĈEĤOSLOVAKA-SOVETA AMIKECO

La Asocio de la Ĉeĥoslovaka-Soveta Amikeco prenis sur sin grandan kaj penindan taskon pliintensigi kaj firmigi nian amikecan kaj aliancanan ligon kun USSR. Ĝian agadon akceptas la ĉeĥoslovaka laboranta popolo dankeme kaj ĝoje, kaj ĝi trovas en ĉiuj regionoj de nia ŝtato ĝojigan eĥon. Tiu ĉi amikeco havas ja sian tradicion kaj estis preparata jam en la pasinta jarcento, en la tempo de nia malfacila nacieca luktado kaj de nia nacia renaskiĝo, kaj ĝi estis subportata per la kredo je la grandaj forto kaj estonteco de la rusa nacio kaj per la altiremo de ties bela kaj humana kulturo. Jam niaj patroj kredis, ke Rusio foje ricevos gvidan rolon en la familio de la slavaj nacioj, kiujn tiam estis trafinta peza sorto de sociala kaj nacieca subpremo. Ĉi tiu kredo estis tiutempe pli vere sentimenta kaj mistika, sed tamen ĝi ne trompis nin. La Granda Oktobra Revolucio, realigante la neklarajn klopodojn kaj sopirojn de la pli fruaj generacioj de progresemuloj, estis rezulto de longa kaj obstina batalo de la rusa proletaro, al kiu estis donita de Lenin efektiva revolucia programo, malfermanta novan epokon en la historio de l'homaro. La Oktobra Revolucio akcelis la falon de Germanio kaj la internan ruiniĝon de la malnova aŭstria-hungara monarkio kaj kreis ankaŭ premisojn por ŝtata memstariĝo de la nacioj mezeŭropaj.

La Oktobra Revolucio, la genia filozofio de Lenin kaj Stalin kaj de la Stalina Kvinjara Plano, donis al la rusa nacio moralan forton, por ke ĝi fariĝu kerno de granda socialista regno, kiu sola estis kapabla rezisti la impeton de la tutmonda reakcio, faŝismo kaj naziismo kaj kiu nin savis de eterna sklaveco. Oni povas diri, ke sen la Oktobra Revolucio hodiaŭ eble eĉ ne ekzistus la ĉeĥa nek la slovaka nacioj. Kiam en la jaro 1945 ni ĝojegis pro la mirakla liberigo de Ĉeĥoslovaka Respubliko, danke ni rememoris la grandajn oferojn, kiujn la soveta popolo estis farinta en la dua mondmilito. Ni rememoris la ruĝarmeanojn, kiuj falis en la bataloj sur nia teritorio. Ilia nombro multe superas cent milojn. Iliaj tomboj troviĝas dise sur la deklivoj de la Karpata Montaro en la valoj de Váh kaj Hron, en la arbaroj de la Beskidaj Montoj kaj en la ĉirkaŭaĵo de Moravská Ostrava, kie sur la fortikigitaj deklivoj de Jeseníky multo da soveta sango estis elverŝita, por ke oni savu nian grandan industrian centron, kian prezentas Ostrava kaj Vítkovice. Tombojn de ruĝarmeanoj oni trovas en sudo de Moravio, ĉirkaŭ Hodonín kaj Břeclav, en la ĉirkaŭaĵo de Brno, kie marŝalo Malinovskij estis konkeranta la Bohem-Moravian Montetaron, kaj fine ankaŭ en la meza Bohemio, en la Labe-regiono kaj en la valo de Vultavo, kie la tank-korpusoj de la Heroo de USSR marŝalo Rybalko venke batalis kontraŭ la nazi-armeoj, endanĝerigantaj Pragon. Ĉiuj ĉi tomboj elokvente atestas, kiel multkoste oni devis pagi la liberigon de Ĉeĥoslovaka Respubliko, eĉ post kiam la Ruĝa Armeo en sennombraj bataloj venkis la naziistajn hordojn kaj finis sian triumfan marŝon ekde Stalingrado ĝis Berlino. Jam pro tiu ĉi kaŭzo ni ŝuldas egan dankon al niaj liberigintoj. Sed ankaŭ nuntempe ĉiam pli multe evidentiĝas la sava rolo de USSR.

En maio 1945 ni komencis novan vivon en la liberigita Respubliko kun profunda dankemo al Soveta Unio pro ĉio, kion ĝi en la pasinteco estis farinta por ni kaj kun firma konfido al ties pacama politiko, kiun ĝi ankaŭ tuj dekomence sincere kaj senrezerve praktikis. La samon sentis ĉiuj progresemaj homoj en la tuta mondo. Sed la reakciularo, kiu jam en la tempo de la milito estis preparanta novan kontraŭsovetan blokon, rapide rekonsciiĝis el sia surprizo super la granda venko de la sovetaj armiloj. La kapitalista mondo sekve de la leĝeco karakterizanta ties ekonomion denove estas pelata al krizo kaj al novaj internaciaj konfliktoj, konkeroj kaj al novaj militoj. La reprezentantoj de la kapitalista mondo emas fari novan aliancon kun nova Hitler, kaj, se estus necese, eĉ kun diablo, por nur savi siajn kapitalistajn interesojn. Ili emas eĉ eksplodigi novan mondmiliton. Soveta Unio fariĝas firma punkto, ĉirkaŭ kiu grupiĝas ĉiuj nacioj, kiuj sincere sopiras pacon. La laboranta popolo de ĉiuj landoj rigardas Sovetan Union kiel grandan idean forton, kiu nin povas senigi je la malbeno de kapitalismo kaj imperialismo. Ju pli multe la kapitalista mondo klopodas frakasi kaj dispartigi niajn vicojn, des pli multe ni sentas la bezonon kunamasigi niajn falangojn ĉirkaŭ USSR, eluzi ties valorajn spertojn kaj la helpon, kiun ĝi tiom malavare donas al ni ĉe nia socialista konstruado.

En la lumo de la hodiaŭa drameca evoluo de l'internaciaj interrilatoj kaj de la granda morala kaj ekonomia krizo, en kiun la kapitalista mondo ĉiam pli multe envadas, nia popolo ĝuste sentas, kion signifas por ni la amikeco kaj la alianco kun USSR. Tial ankaŭ la Tagoj de la Ĉeĥoslovaka-Soveta Amikeco, kiujn ni ĝuste nun travivas, pasas en ĝoja emocio, atestanta pri tio, sur kiom fruktodonan grundon falas la semoj, kiujn semas la Asocio de la Ĉeĥoslovaka-Soveta Amikeco.

Ne forgesu nin informi, ĉu kaj kiamaniere vi uzas la artikolojn el nia bulteno por sekurigi la pacon kaj interpopolan kunlaboron.

*Ministro Alois Petr:*

## SUR LA FLANKO DE PROGRESO KAJ PACO

La Tagoj de la Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco — okaze de la datreveno de la Granda Revolucio Oktobra — estis ne sole solena festado. Tio estus tro malmulte. Ili estis esprimo de dankemo — aktiva kaj sponta — sentata de nia tuta popolo al nia plej fidela aliancano, liberiginto kaj senprofita helpanto en la nova konstruado de nia militdetruita ekonomio.

Same kiel ĉie, kie temas pri la plej alta intereso de la ŝtato kaj pri la bono de la ĉeha kaj slovaka nacioj, same ĉi tie aliĝas konscie kaj ĝoje ankaŭ la membroj de la Ĉehoslovaka Partio Popola. Ili kunlaboras en la politika kaj ekonomia konstruado de la ŝtato, kaj ili faras tion ankaŭ nun, kiam ni danke rememoras tiun, kiu ebligis al ni pacan konstruan laboron — Sovetan Union.

Ĉiun tagon ni vidas pli kaj pli klare, kiel firma kaj fidinda apogo estas por ni tiu de la plej granda slava ŝtato. Jam en 1925 mi skribis en Lidové Listy artikolon favore al agnosko de Sovetunio, kaj poste prelato Fr. Světlík batalis por rekono de ĉi tiu Unio en la parlamenta komitato por la aferoj de la eksterlanda politiko.

Se ni turnas nin al Okcidento, ni vidas kaoson politikan kaj ekonomian. La ŝajne firma konstruo de la teknike progresintaj ŝtatoj kapitalistaj, apogita je la potenca ekonomia potencialo de Unuiĝintaj Ŝtatoj Nord-Amerikaj, skuiĝas en sia fundamento mem. Simptomoj de nova ekonomia krizo neretenеble vidiĝas, sekvataj de la malplivalorigo de la mono, kiu malaltigas la internan valoron de salajroj de la laboruloj kaj per tio ilian vivonivelon. Granda Britlando deklaras programon de krizotempo, kiu siavice pli malvastigas la zonrimenon de la laborantaj britoj. Francio ŝanceliĝas en konfuzo kaj en registaraj krizoj kaj la ceteraj kapitalistaj ŝtatoj kun timo atendas, kion alportos la morgaŭo.

En akra kontrasto kun tiu ĉi vere senĝoja situacio de la kapitalista mondo staras nia propra situacio. Kien ajn ni rigardas en nia patrujo, ĉie ni vidas viglan laboradon en fabrikoj, oficejo kaj kampoj. Nenie estas timo pri la morgaŭo, pri tio ĉu ni havos laboron, ĉu vi havos panon. Ĉe ni ne ekzistas socialaj tumultoj kaj demonstracioj, ĉar ĉe ni, en la popola demokratio, la popolo fakte regas kaj ĝian suverenan volon plenumas la registaro de la Nacia Fronto, kies valora kaj egalrajta komponento estas ankaŭ la ĉehoslovaka partio popola.

Por ĉio, por tio ke ni havas kvietan perspektivon al la estonteco, por tio ni dankas nur al tio, ke ni estas parto de ĉiam pli forta kaj pli kreskanta tendaro de la paco kaj demokratio gvidata de Sovetunio. En kiu alia maniero ni povus eviti la politikajn ekonomiajn skuojn, kiujn ĉiam en pli granda mezuro suferas la kapitalista mondo? Simile antaŭ mil jaroj, kiam minacis nin la germana ekspansiemo en sfero de kulturo kaj de nacieco, ni turnis nin al Oriento, de kie ni akceptis la kristanismon kaj la plej grandajn valorajojn kulturajn, sur kiuj sin bazas nia tuta tradicio nacia. Simile ankaŭ la unuaj vekantoj de la nacio, laikuloj kaj pastroj, kies nomojn ĝis nun la popolo eldiras kun estimo kaj dankemo, turnis siajn okulojn al la granda rusa popolo. Tiel ankaŭ ni en la malfacilaj tempoj postmilitaj apoĝis nin al Sovetunio. Ni sekurigis al ni tiel la necesan trankvilon por realigado de gravegaj reformoj sociaj kaj ekonomiaj, por kiuj, dum longaj jardekoj, la progresemaj kristanoj batalis ĉe flanko de la ceteraj reprezentantoj laborulaj kaj ni faciligis nian enviciĝon en la sferon de planata ekonomio, kiu ebligas al ni juste rekompenci la faritan laboron kaj — kvankam malrapide — senĉese kaj seninterrompe plialtigadi la vivonivelon de la laboruloj.

Pro tio la tuta ĉehoslovaka popolo danke rememoris en ĉi tiuj tagoj Sovetunion, kiu — la unua — realigis la grandajn planojn de la egaleco kaj de la sociala kaj ekonomia libereco de la homo. La finiĝo de la Tagoj de la Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco estas la tago de la 70a naskiĝtago de la viro, kiu kondukis Sovetunion de unu sukceso al alia en la batalado kaj la *konstruado* — *J. V. Stalin*. Lia ekzemplo kaj ekzemplo de Sovetunio brilas ĉiam pli potence sur la vojo, kiun la nacioj de l'mondo marŝas al libera estonteco kaj sur kiu ni — danke nian aliancon kun Sovetunio — jam trairis tiom grandan vojparton.

La plej elokventa atesto de tio, ke la nacio ekkomprenis la historian signifon de nia alianco kun Sovetunio, estas la grandega nombro da aliĝoj al la Societo de la Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco kaj ankaŭ la neordinara intereso pri studo de la rusa lingvo. Same la Ĉehoslovaka Partio Popola kun siaj membroj starigis sin ankaŭ en tiu ĉi kazo en la unuan vicon kaj plene partoprenas en la tutnacia kampanjo de la Tagoj de la Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco. Por pruvi tion, ĉiuj membroj de nia partio fariĝos membroj de la Societo de la Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco.

Trad. Era

*J. Niederle:*

## NI PLIPROFUNDIGAS NIAN RILATON AL SOVETUNIO

En la pasintaj tagoj ni rememoris la 31-an datrevon de la restarigo de nia ŝtata sendependeco. Ni repensis pri la memorinda 28-a de oktobro 1918, kiam estis proklamita la memstara ŝtato de ĉehoj kaj slovakoj — Ĉehoslovaka Respubliko. Ni rememoris pli intense ol en alia tempo kiel grandan signifon por la restarigo de nia nacia sendependeco kaj por la respublika formo de nia ŝtato havis la Granda Oktobra Revolucio kune kun la rekono de la rajto je libereco kaj je memdestino de la nacioj, postulita de la soveta registaro en la unua packonferenco de Brest Litevskij, decembron 1917. Oni ne kontestas nek plu kontestos, ke sen la Granda Oktobra Revolucio, sen ĝia 7 de novembro, ne estus la 14-a nek la 28-a de oktobro 1918. La 14-an de oktobro la ĉehoslovaka laboranta popolo proklamis la fondon de memstara popola kaj demokrata Respubliko Ĉehoslovaka, sed post la 28-a de oktobro 1918 en tiu respubliko decidis ne la popolo, sed Švehla, Kramář, Stříbrný, Stránský kaj la malbonfama financa magnato dro Jaroslav Preiss, kiuj uzis ĉian influon, por ke la juna respubliko ne estu popola kaj socialista.

Al ili konvenis respubliko burĝa, apoganta sin al la imperialistaj ŝtatoj de la okcidenta Eŭropo. Tiamaniere jam en tiu tempo ili ekiris la vojon, kiu finiĝis per Munheno. Ni ne povis ne rememori la konsekvencojn de la perfido farita de niaj okcidentaj aliancanoj en 1938, kiam la registaroj de Anglio kaj Francio, gvidate de Chamberlain kaj Daladier, oferis en Munheno Ĉehoslovakion al Hitler kaj tiel ebligis eĉ la atakon kontraŭ Soveta Unio. Tiam, en septembro 1938 nia nacio leviĝis por defendi sin kontraŭ la naziistaj invadintoj volante kun armiloj en la manoj defendi la integrecon de la Respubliko kaj sian liberecon. Sed la registaro de Hodža ne volis peti pri helpo Sovetan Union. Ĝi prefere akceptis la humiligajn kondiĉojn de la kapitulaco. Per la forŝiro de niaj landlimaj regionoj ĝi faris neebla la defendon kaj tiel ĝi preparis baldaŭ poste — en printempo 1939 — la okupacion de la restinta teritorio kaj la starigon de la Protektorato Böhmen und Mähren? En ĉi tiu kriza tempo la burĝaj politikistoj oferis la nacian kaj ŝtatan liberecon de nia popolo kaj la interesojn de nia popolo, nur por ke ne suferu la interesoj de ilia posedaĵo.

En la tempo, kiam estis decidate pri la ekzisto de nia nacio, kiam ni staris sur la rando de la tombo de nia nacia kaj ŝtata sendependeco, tiam venkis la strebado pli firme alpremiĝi al Sovetunio. La aliancon kaj la amikecon ni firmigis per novaj kontraktoj. Sovetunio, kiu neniam rekonis la validecon de la Munhena diktato kaj kiu estis preta helpi nin en la batalo kontraŭ la uzurpintaj okupantoj, ne rifuzis ankaŭ poste iun ajn helpon. En julio 1941 Sovetunio agnoskis la ĉehoslovakan registaron, ebligis la kreon de la ĉehoslovaka armeo en Sovetunio gvidata de generalo Ludvík Svoboda, ebligis al ni la enlandan batalon kontraŭ la okupantoj. En decembro 1945 Sovetunio faris kun ni novan aliancan kontrakton pri sia helpo al nia Respubliko en la batalo de nia popolo por rea akiro de la nacia kaj ŝtata memstareco. La venkaj bataloj de la glora Ruĝa Armeo ĉe Moskva, Leningrad, Stalingrad, Kiev, la venka kaj tiom kare pagita transiro de la Karpatoj ĉe Dukla-pasejo, estis bataloj ankaŭ por nia libereco.

Sovetunio en granda mezuro helpis do al nia liberigo, sed krome, jam en la unuaj tagoj post tiu liberigo, ja eĉ dum la krakado de la malamikaj bomboj kaj grenadoj, ĝi helpis al ni rebonigi la grandajn domaĝojn kaŭzitajn de la longjara okupacio kaj konsiderinde kontribuis al sekurigo de nia nutrado-situacio. Sovetunio estas ne sole nia amiko kaj aliancano, sed ankaŭ modelo kaj instruisto. Ĝi estas nia modelo por planado de nia ekonomio, por novaj formoj de la ekonomia entreprenado, por novaj labormetodoj kaj por pligrandigado de labor-produktiveco, modelo de zorgado pri laboranta popolo. Ĝi estas nia modelo kaj instruisto en nova eksperimentado, en kulturo kaj korpedukado, ĝi estas nia instruisto sur nia vojo al la socialismo.

Tion ni memoros ĉiam, ne sole en la ĵus pasintaj Tagoj de Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco. La ekonomia kaj defenda potenco de nia granda aliancano defendos nin kontraŭ ĉia danĝero. Senigitaj je nova danĝero de atako el faŝista Germanio, ni povos trankvile kaj pace daŭrigi nian konstruan laboron sen timo, ke la fruktoj de nia laboro estos detruitaj per nova milito.

Ni do gardas, plifirmigas kaj pliprofundigas nian aliancon kaj nian amikecon kun Soveta Unio. Ni lernas de ĝiaj popolij. Ni konatiĝas kun ĝiaj literaturo kaj arto, kun ĝia kulturo. Ni konatigas kun la vivo de soveta laboristo, terkulturisto kaj scienculo. Ni konatiĝas kun la maniero de ilia vivo kaj laboro. Kaj ni lernos iliajn lingvon kaj skribon.

Trad. Era

*N. Matjuŝin:*

## LA NACIA FIERECO DE LA SOVETAJ HOMOJ

La nacia fiereco de la sovetaj civitanoj apartenas al la brilaj kvalitoj de la soveta laboranta popolo, edukita de la Lenin-Stalin-partio.

La nacioj de la soveta lando rajte fieras pri tio, ke neniam ili paciĝis kun la premado kaj malbonvolo, ke gvidate de la heroa rusa laborista klaso kaj de la bolŝevika partio, ili atingis la historian venkon en oktobro 1917. Ili fieras pri tio, ke dum la kruela carismo ili kreis progreseman kulturon, saturitan de liberigo-ideoj, ke la soveta lando estas patrujo de la leninismo, la plej alta kulmino de la rusa kaj tutmonda kulturo.

La sovetaj homoj estas fieraj pri tio, ke ili vivas kaj laboras en la epoko de Lenin kaj Stalin, en la tempo de venka komunismo, ke ilian triumfan vojon pribrilas la grandaj ideoj de leninismo, kiuj fariĝis batalprogramo de milionoj da homoj sur la terglobo, ke ili forigis — gvidate de la bolŝevikoj — la regadon de ekspluatistoj, starigis sovetan registaron kaj liberigis la landon el la subpremo de bienuloj kaj kapitalistoj kaj kreis kondiĉojn de ĝia plua disvolvigo per la vojo de socialismo.

La Oktobra Revolucio 1917 kreis la plej progreseman ŝtatan reĝimon, forigis la subpremadon de la nacioj kaj starigis ilian egalrajtecon en ĉiu sfero de la ŝtata kaj socia vivo. Per tio la soveta lando antaŭas la kapitalistajn ŝtatojn je unu tuta historia epoko. Sovetunio estas modela ŝtato de multaj nacioj kaj en ĝi la problemo de nacioj kaj de ilia kunlaborado estas solvita pli bone ol ie ajn alie.

La venka socialismo funde ŝanĝis la aspekton de la soveta lando. La antaŭa malforta kaj senprogresa lando fariĝis lando soveta kun potenca industria kaj kolhoza ŝtato. La Oktobra Revolucio donis al la homoj liberecon, materialan bonstaton kaj eblon de kultura vivo. La Oktobra Revolucio kaj la soveta reĝimo senigis la laborulojn je malfeliĉoj de la burĝa socio — je krizoj, produkto-anarkio, senlaboreco, ekspluatado de homo fare de homo, je parazita alproprigado de la fruktoj de kolektiva laboro kaj je aliaj fiaĵoj de la kapitalismo.

La lenin-stalina nacieco-politiko sekurigis harmonian kunfandiĝon de la naciaj tradicioj kaj de la naciaj interesoj kun la komuna intereso de ĉiuj sovetaj laboruloj. Multaj nacioj en Sovetunio venis al la socialismo sen neceso trairi la periodon de la kapitalismo-disvolvo.

La partio de Lenin-Stalin edukis la sovetajn homojn al sindona amo al la patrujo kaj al malamo kontraŭ ĝiaj malamikoj. Gi edukis en ili batalan nepacigeblecon kun la naciismo kaj kosmopolitismo, ĝi altigis ilian energion kaj iniciativon en batalo por senĉesa kreskado de la potenco kaj gloro de la socialista ŝtato.

Unu el la fundamentoj kaj la plej grava karakterizo de la soveta fiereco nacia estas la harmonia kuniĝo de patriotismo kaj internaciismo. Sen diferenco de la nacio, al kiu la soveta civitano apartenas, li estas antaŭ ĉio *s o v e t a* civitano, filo de socialista patrujo, kreanto de nova socialista vivo. Por li ne ekzistas pli granda honoro ol estas la honoro esti soveta civitano; por li ne ekzistas pli granda nacia fiereco ol estas la fiero de membro de granda armeo da konstruantoj de komunista socio. En la fiereco de la sovetaj homoj la nacia fiero estas kunigita kun la sento de internaciismo, kun la komunista konvinko. Kaj en tiu harmonia kuniĝo leviĝas antaŭ la tuta mondo nova socia fenomeno, ĝis nun nevidata kaj karakteriza por la nuntempo.

La soveta nacia fiereco ne konas nacian arogantecon nek nacian nihilismon. Ĝi personigas, en ĝermo, la plej altan internacian unuecon de la laboruloj, kiu estos atingita en la komunismo. La amo al la patrujo estas ja ĉe la sovetaj homoj kunigita ankaŭ kun la senĉesa batalo por la interesoj de la tuta progresema homaro, por la firmigo de internaciaj ligiĝoj inter la laboruloj kaj por ilia internacia solidareco. Tio montriĝis antaŭ la milito, kaj precipe dum la Granda Patriota Milito, sed ankaŭ post la milito. Soveta Unio kaj ĝiaj militfortoj plenumis dum la milito sian gloran mision kaj liberigis la tutan mondon el la sklaveco kaj minaco de la germana jugo. Hodiaŭ, Soveta Unio marŝas plu frunte de internaciaj revolucie-demokrataj fortoj en ilia batalo kontraŭ la reakcio kaj imperiismo kaj ĝi estas nevenkebla bastiono de la demokratio kaj socialismo.

La soveta nacia fiereco havas — same kiel la soveta patriotismo — aktivan, vivodonan karakteron. La sovetaj homoj, plenigitaj de tiu nobla sento, ofereme batalas por nova prospero de la ekonomia kulturo kaj bonstato en sia patrujo, ili strebas pri konstanta kresko de la sociaj riĉaĵoj kaj labor-produktiveco, ili kun vigla atento defendas la akiraĵojn de la socialista revolucio kontraŭ la intrigoj malamikaj kaj ili ne domaĝas fortojn nek vivon por defendi la patrujon. La antaŭmilitaj Stalin-kvinjarplanoj, la Granda Patriota Milito, la postmilita periodo de disvolviĝo de Sovetunio — ĉiu ĉi periodo estas plenigita per heroa batalo de la popolamasoj por la partio, por la komunismo. La multmiliona soveta popolo agas kiel unusola konkorda familio, kiel armeo de konstruantoj de la komunista socio.

La fonto de la nacia fiereco de la sovetaj homoj estas la saĝa lenin-stalina politiko kaj la senlaca organiza agado de la bolŝevika partio, sekuriganta per sia gvido ĉiujn historiajn venkojn de la soveta popolo, la partio, kiu laŭ la vortoj de Lenin estas „racio, honoro kaj konscienco de nia tempo".

La soveta popolo estas plenigita per fiero pri tio, ke el ĝia sino naskiĝis tiu ĉi glora partio, ke la soveta lando donis al la mondo la geniajn gvidantojn de la laboruloj *Lenin* kaj *Stalin*; ke la tuta moderna progresema evoluo sur la terglobo okazas en signo de la grandaj lenin-stalinaj ideoj, sub influo de la soveta socialista revolucio kaj de la venka socialismo en Sovetunio. Kaj ĝi klopodas esti inda je sia epoko.

Tr. Era

## LA ĈEĤA-RUSA AMIKECO ANTAŬ 150 JAROJ

*Kelke da rememoroj pri la restado de rusaj soldatoj en la ĉeha urbo S o b ě s l a v en la jaroj 1799—1800*

„En la jaroj 1799 kaj 1800 marŝis tra la ĉeha lando amasoj da rusaj soldatoj. Niaj antaŭuloj bonvenigis ilin ĝoje, ili volonte ilin priservis, kaj vidante tian potencon de la frata slava nacio, ili sin firmigis en la espero, ke helpe de la rusoj kaj de aliaj slavoj ili povus iam liberiĝi el la jugo de la germaniga premado."

Tio estas fragmento el malnova enskribo el la jaro 1799, kiun oni ĵus en ĉi tiuj tagoj trovis en la muzeo de urbo Soběslav. Antaŭ 150 jaroj, la 23-an de oktobro 1799 venis en Soběslav la unua parto de la armeo de generalo Suvorov, kiu marŝis al Italio kontraŭ Napoleono. La loĝantaro de Soběslav akceptis la rusajn soldatojn tre ĝoje kaj solene. La bonvenigan paroladon havis tiam la regiona komisaro Bořek Dohalský, pri loĝado kaj manĝado bone zorgis urbano František Ulrich. La oficiroj kaj multaj el la soldatoj loĝis kaj manĝis ĉe la urbanoj, la ceteraj en pli grandaj loĝejoj. La manĝaĵoj estis abundaj. La urbestraro aĉetigis tiom da kort-birdaro, ke oni eĉ ne kapablis konsumi ĝin. Ĉiu soldato ricevis tage, krom supo, funton da viando kaj trionlitron da brando. La gastigado estis senpaga kaj la rusaj soldatoj estis ege kontentaj.

La urbo Soběslav travivis dum ilia ĉeesto multon da gajaj tagoj. En la urbon estis invitita la 25membra kapelo el vilaĝo Hlavatce, tre fama en la tuta regiono, kaj tiu ludis al la gastoj. La rusoj prezentis siajn naciajn dancojn, kantis siajn naciajn kantojn, kaj tiujn ellernis multaj el la loĝantoj de Soběslav.

Post tiu ĉi parto de la Korsakov-regimento venis al Soběslav ankoraŭ pluaj ĝiaj partoj, venantaj al la urbo en la intertempo de du-tri semajnoj. La lasta parto, 523 viroj, estis loĝigita tie komence de decembro.

En la Tagoj de la Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco ni ŝatas rememori pri la supra fragmento el la malnova enskribo de urbo Soběslav. Le esperoj tie esprimitaj plenumiĝis. La glora Ruĝa Armeo elpelis la germanojn en nia lando, senigis nin je ilia kruela regado kaj eble eĉ je plena ekstermo. Pro tio, en la koro de ĉiu bona ĉeĥo, reviviĝas tiom da dankemo al la soveta popolo, kiom estis en ĝi en majo 1945 Kaj ĝi neniam malaperos, ĉar nur tiu ĉi popolo estas nia plej sincera kaj ankaŭ plej potenca amiko kaj protektanto.

Trad. Era

# PAROLAS RUDOLF SLÁNSKÝ:

Merkredon vespere, la 7an de decembro 1949, okazis en Praha kunveno de l'funkciuloj de la Regiono Praha de la Komunista Partio Ĉeĥoslovaka por aŭskulti raporton de la ĝenerala sekretario partia Rudolf Slánský pri la rezultoj de la lasta konferenco de l'Informoficejo de la Komunistaj kaj Socialistaj Partioj. En la unua parto de sia diskurso la deputito Slánský akcentis la ekziston de du antipodaj blokoj en la mondo. La bloko de paco, kiun estras Soveta Unio, gvidas konsekvencan batalon kontraŭ la militagitantoj. Ĝi defendas la pacon, demokration kaj sendependecon de la nacioj. La alia bloko, gvidata de Usono, celas sklavigi la ceterajn naciojn kaj preparas novan militbuĉadon.

La usona imperiismo transprenis nuntempe la rolon, kiun estis ludinta antaŭ la dua mondmilito Hitler. Same kiel Hitler pligrandigadis pormilitajn elspezojn, ankaŭ Usono faras nun tion saman. Ĝi disponigas por la militelspezoj dudekoble pli multe ol antaŭ la milito, ĝi elspezas ĉiusemajne pli multe por milito, ol estas la sumo de l'tutjara buĝeto por la zorgado pri popolsano. La deputito Slánský konstatis pluajn analogiojn inter Hitler kaj la usona imperiismo. Li akcentis, ke Hitler, okupinte Ĉeĥoslovakion en 1939, diktis malplivalorigon de ĉeĥoslovaka krono rilate al la marko; ankaŭ Usono atingis malplivalorigon de alilandaj monsistemoj per la ordono devalorigi ilin. Kiel Hitler faris kontraktojn kontraŭ la Kominterno kaj konstruadis „Aksojn", tiel Usono faras la Atlantikan Kontrakton kaj la t. n. Okcidentan Blokon. — Parolante pri la procesoj kontraŭ Rajk en Hungario kaj kontraŭ Kostov en Bulgario, la dep. Slánský akcentis similecon de tiuj ĉi faŝistaj spionoj kaj agentoj de la internacia imperiismo al la „Kvina Taĉmento", kiun Hitler konstruis antaŭ la dua mondmilito en la landoj, kiujn li volis malkomponi de interne. La imperiistoj klopodas preni al la popolo ĉiujn akirojn kaj liberojn kaj revenigi ĝin en sklavigon kaj ekspluatadon. Ĉi tiel — diris la dep. Slánský — per funkciigado de spionoj, per subtenado al la reakcio, per politika premo, militistaj aranĝoj, ekonomie-konkera politiko, sklavigado de nacioj, la brit-usonaj imperiistoj preparas siajn aventurajn militplanojn. Sed tiu ĉi febra preparado de nova milito neniel estas signo de ilia kreskanta forto. Ĝuste male, *la fortoj de la paca kaj socialisma bloko kreskas.* La ekonomia prosperado de Sovetunio, kaj de la landoj popoldemokratiaj, la fakto, ke Soveta Unio, la egido de paco kaj de sekureco de la nacioj, estas nun multe pli forta ol en la tempo, kiam ĝia glora armeo kaŭzis decidan malvenkon de la hitlera Germanio, estas dokumento pri tio. La porpaca bloko estas nun pli forta ol antaŭ dek jaroj, ne nur pro tio, ke Sovetunio estas pli forta, sed ankaŭ pro tio, ke ĉe ĝia flanko staras la landoj de popola demokratio, la heroa ĉina popolo.

Nova kontribuo por la tendaro de paco kaj socialismo estas la Germana Demokratia Respubliko. Precipe la ĉeĥoslovaka popolo konscias, kian grandegan ŝanĝon tio signifas por ĈSR. La germanaj nobelaj kaj poste kapitalistaj registaroj minacis ja, dum jarcentoj, la ekziston kaj memstarecon de la ĉeĥoslovakaj nacioj. La unuan fojon en la historio la reprezentantoj de la laboranta popolo, kiuj ne havas konkerajn celojn kaj sekvas pacan politikon, fariĝas gvida forto de la Germana Demokratia Respubliko. Sed la grandega kreskado de la fortoj de l'demokratia kaj socialisma bloko ne inspiru opinion, ke la danĝero de milito malpliiĝas per tio, ke ne necesas plu batali kontraŭ la milit-instigantoj. Oni havas nun pli favorajn kondiĉojn kaj disponas pri multe pli grandaj fortoj ol iam ajn antaŭe por vanigi la planojn de la militinstigantoj. Sed ne sufiĉas kontentiĝi per la konscio, ke la nacioj ne volas militon, ke ili volas pacon — diris la dep. Slánský. Necesas aktive batali por paco, la volon de la centmilionoj da homoj transformi en grandegan naturan forton, kiu bridus la atakantojn. La rezolucio de la Informoficejo repensigas do ĉiujn komunistajn partiojn pri ilia granda respondeco kaj taskas al ili mobilizi vastajn popoltavolojn en tutnacian movadon por aktiva defendo al paco, malkaŝadi ĉiutage intencojn de la imperiistaj militinstigantoj kaj labori por plua plifortigo kaj prosperigo de la paca kaj demokratia bloko.



*La membroj de la Ĉs. Registaro la Ĉefministro A. Zápotocký kaj Ministro de Instruado, Scienco kaj Arto Dro Z. Nejedlý subskribas la salutleteron por la granda amiko de la ĉeĥoslovaka popolo Generalisimo J. V. Stalin okaze de ties 70a naskiĝotago 21a decembro 1949.*

# PRI LA PANO EKSTERLANDE KAJ EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO

*Ekde la 1a de oktobro 1949 la pano, bakaĵoj, faruno kaj terpomoj estas libere aĉeteblaj.*

Decidis tion la Registaro de nia popol-demokratia Respubliko, kaj sabate, la 17an de oktobro, la prezidanto de la Registaro Antonín Zápotocký anoncis tiun ĉi ĝojigan informon al la tuta publiko.

*La prezo de la pano ne plialtiĝas.*

La reakciaj flustremuloj refoje mispafis. Kiom multe oni parolis, post kiam aperis la unuaj sciigoj pri la reliberigo de la panaĉeto, ke la prezo de la pano ege plialtiĝos! Oni parolis pri dekkrona prezo, kelkaj panikfarantoj eĉ flustris, ke la pano kostos tridek kronojn. Kaj jen la panaĉeto liberiĝas, kaj la prezo restas neŝanĝita. Kilogramo da pano kostas kvin kronojn, same kiel ĝis nun. Hodiaŭ la disvastigantoj de la reakcia flustra propagando estas objekto de ĝenerala rido.

*Diru sincere, kie ekzistas pano same malkara.*

Krom en Soveta Unio verŝajne nenie en la tuta mondo. Oni komparu la prezon de nia pano kun prezoj eksterlandaj, transkalkulitaj je nia valuto:

| | valuto | prezo | transkalk. je Kčs |
|---|---|---|---|
| Svislando | svisaj frankoj | 0.48 | 5.60 |
| Aŭstrio | ŝilingoj | 1.90 | 9.50 |
| Kanado | britaj pencoj | 12 50 | 10.25 |
| Italio | liroj | 140.— | 12.60 |
| Usono | cendoj | 31.— | 15.40 |

Samtempe oni devas konsideri, ke la efektiva salajro de laboristoj (okupitaj!) en kapitalismaj landoj estas pli malalta ol ĉe ni.

*Ĉe ni neniu plu malsatos.*

Pli ol unu persono ĉe la hodiaŭa okazo rememoras la Unuan Respublikon. Kia estas lia nuna laborenspezo, kaj kia ĝi estis tiam! Por kia kvanto da pano li perlaboras monon en unu horo hodiaŭ, kaj por kia kvanto li perlaboris tiam:

Mezgranda salajro de terkultura laboristino en Ĉeĥoslovakio antaŭ la milito sumiĝis je 1.05 Kč por unu horo, tiu de helplaboristino en Prago je 1.25 Kč por unu horo. Kilogramo da pano kostis 2 ĝis 2.10 Kč. Terkultura laboristino devis labori 2 horojn, por povi aĉeti 1 kilogramon da pano.

En la jaroj 1931 ĝis 1937 laboristo por mezalta unuhora laborenspezo 2.60 Kč povis aĉeti 1.20 kg da pano.

Ĉi-jare ĉe mezgranda unuhora enspezo 18.20 Kčs laboristo perlaboras en unu horo monon por 3.60 kg da pano, t. e. por trioblaĵo!

Pli frue, se laboristo estis senokupa — kaj senlaboruloj en la tempo de la Unua Respubliko sumiĝis je centmiloj — li ne perlaboris monon por povi aĉeti eĉ la etan kvanton da pano, kaj lia familio malsatis.

Hodiaŭ tia tempo estas jam pasinta. Hodiaŭ, kaj jam por ĉiam, neniu plu ĉe ni malsatos, la sano de infanoj ne estos plu difektata per manko kaj nesufiĉa nutrado.

Tion ni dankas al la revoluciaj ŝanĝoj, kiujn ni efektivigis per komuna strebado sub gvido de la Komunista Partio.

Tion ni dankas al nia respublikestro Klement Gottwald, al ties saĝa gvidado.

Tion ni dankas al la potenca egido de Soveta Unio kaj de kamarado Stalin.

*La plialtigitajn prezojn de la faruno oni kompensas per kromsalajroj porfamiliaj.*

La prezoj de la faruno plialtiĝas jene:

| | | pli frue | ekde la 1a de oktobro 1949 |
|---|---|---|---|
| sekala panfaruno | por 1 kg | 5.20 Kčs | 7.50 Kčs |
| tritika glata faruno | por 1 kg | 5.80 Kčs | 7.50 Kčs |
| tritika malglata faruno | por 1 kg | 7.— Kčs | 13.— Kčs |
| griaĵo | por 1 kg | 7.20 Kčs | 13.50 Kčs |

Al la novaj prezoj de la faruno post la 1a de oktobro alkonformiĝos ankaŭ la prezoj de la blankaj bakaĵoj.

*La libere vendata pano estas pli bonkvalita.*

Por same alta prezo nia pano estas nun pli blanka, pli bonkvalita. Dum la milito kaj eĉ ĝis antaŭ nelonge oni la grenon pli multe elmuelis, por akiri pli multe da faruno kaj malpli multe da brano. Tiu ĉi militkonforma elmuelado nun ankaŭ foriĝas. Ni enkondukas elmueladon ĉe tritiko je 73% kaj ĉe sekalo je 75%. Per tio la kvalito de la faruno kaj de ĉiuj produktoj el ĝi pliboniĝas.

*Kial oni plialtigas la prezojn de la faruno?*

Ĝis nun oni vendis ĉe ni la farunon por pli malaltaj prezoj, ol kiom kostis ĝia fabrikado. Kiel tio estis ebla? La fabrikadon de la faruno plikarigis la altaj prezoj de la pangreno, kiun la ŝtato pagis al la terkulturistoj. La Registaro klopodis, ke la terkulturisto estu por sia laboro konvene rekompencata, ke li ne estu malutilata per malaltaj prezoj, kiel tion faris la kapitalistoj. Aliflanke altaj prezoj de la faruno troŝarĝus la konsumantojn. Tial oni fiksis la prezojn de la faruno malalte, ili estis malprofitigaj, kaj la reston devis la ŝtato pagi el la t. n. intervena provizaĵo.

Ĉe libera vendado tamen ĉi tia ekonomio ne estas plu ebla. Tial oni plialtigis la prezojn de la faruno.

*La Registaro zorgis, ke la konsumantoj ne estu malutilataj per la plialtigo de la prezoj de l'faruno.*

Kiel oni atingos tion? Temas antaŭ ĉio pri familioj kun infanoj. Al tiuj oni plialtigas la porfamiliajn kromsalajrojn por ĉiu infano je 40 Kčs monate.

Ĉe la plialtigitaj prezoj de la faruno kaj la bakaĵoj elspezas ĉiu konsumanto proksimume je 12 ĝis 16 Kčs pli multe ol ĝis nun. Ekzemple ĉe familio triinfana, t. e. kvinmembra, la plialtigo de la elspezoj sumiĝos proksimume je 75 Kčs monate. La nutranto de tia ĉi familio tamen ricevas per la plialtigo de la porfamiliaj kromsalajroj ne je 75 Kčs pli multe, sed je 120 Kčs. Tio signifas, ke la enspezoj de la laborantoj plialtiĝas pli multe, ol je kiom plialtiĝas ilia elspezo.

La Registaro konsideris ankaŭ la rentulojn, militistajn invalidojn, kaj permilitajn difektitojn, kiuj ne havas infanojn kaj sekve ne ricevas iajn porfamiliajn kromsalajrojn. Tiaj rentuloj kaj ties edzinoj ricevas ĉiumonate je 12 Kčs pli multe ol ĝis nun.

*Ni faris pluan multsignifan antaŭenpaŝon.*

Kiam en la komenco de tiu ĉi jaro oni enkondukis la senkuponan merkaton, kelkaj homoj ne estis kontentaj pri la pli altaj prezoj kaj demandis, kial oni rekte ne forigas la tutan porcian sistemon.

Tamen la senkupona merkato montriĝis bona. Laborantaj homoj aĉetas por mono, kiun ili perlaboras, senkuponajn varojn.

Okaze de la IXa Kongreso de la Komunista Partio diris kamarado Gottwald:

„La nuna stato, kiam ni havas precipe koncerne la nutraĵojn, teksaĵojn kaj piedvestojn kontrolatan ekonomion, kaj kiam ni ĉi-rilate povis liberigi la merkaton nur en limigita amplekso kaj samtempe por relative altaj prezoj — tiu ĉi stato estas nek ideala nek daŭra — sed ĝi estas evitvojo kaj vojo provizora. Nia politiko de post nun estos senkuponigi laŭ ebleco ĉiam pluajn varojn kaj plimalaltigi la prezojn en la libera merkato. Kiel rapide ni povos tion fari kaj kiam ni kapablos la kontrolatan ekonomion entute forigi kaj la prezojn unuecigi — tio dependas parte de la kresko de l'industria produktado, de akurata plenumado de la terkulturistaj liveraĵoj, same kiel de la disvolviĝo de l'eksterlanda komerco."

Per la senkuponigo de la pano, bakaĵoj kaj terpomoj ni plenumas la taskon, kiun kamarado Gottwald donis al la Partio kaj al la tuta laboranta popolo.

Dum dek jaroj ni aĉetis panon, bakaĵojn kaj farunon laŭkupone. Dum tutaj dek jaroj eĉ la plej necesaj objektoj por nia nutrado ne estis senkupone atingeblaj. Alia maniero ne estis ebla. La milito kaŭzis nutromankon, kaj la katastrofa misrikolto en la jaro 1947 tiun ĉi malsufiĉon ankoraŭ plilongigis. Ĉio ĉi finiĝas per la 1a de oktobro. Ekde la 1a de oktobro pano, faruno kaj terpomoj estas aĉeteblaj senkupone. Denove ni faris multsignifan antaŭenpaŝon. „Bone ni faras la aferon," povas al si kontente diri laboristo, terkulturisto oficisto, ĉiu laboranta homo, ĉar ili ĉiuj partoprenas en tiu ĉi nia sukceso.

*Kio ebligis al ni tiom rapide venki la sekvojn de la misrikolto? La plibonigo de la porvivo estas rezulto de terkulturista laboro.*

La terkulturistoj streĉis ĉi-jare, precipe ĉe la rikoltado, ĉiujn fortojn. Ili ekkomprenis la alvokon de nia Partio al laŭplana laboro sur la kampoj kaj al najbareca helpo, kaj tio ebligis al ili atingi tiom altajn gajnojn, kiom nur estis eble.

*La plibonigo de la porvivo estas rezulto de laborista peno.*

Kion sukcesus fari la terkulturistoj, se la Kvinjara Plano ne estus plenumata kaj se la ekonomia mehanismo ne funkcius bone? Tio signifus ĝeneralan nutromankon, ekonomian malordon, kaj ĉio ĉi ne permesus al ni plibonigi la provizadon. Nia Kvinjara Plano estis en la unua jaro ekde januaro ĝis oktobro plenumita je 101,8 procentoj. La plibonigo de la porvivo, kiun ni atingis, estas frukto de peno ne nur de terkulturistoj, sed ankaŭ de laboristoj en la fabrikejoj. Kiom pli malfacile laborus la terkulturistoj sen maŝinoj, sen traktoroj, aŭtomataj grenligiloj, kiujn al ili milope liveras niaj fabrikejoj.

*La plibonigo de la porvivo estas rezulto de ĝusta politiko de la Komunista Partio, ĝi estas frukto de la Registaro de laboristoj kaj terkulturistoj.*

Kiom valorus por ni la tuta penado de la laboristoj kaj terkulturistoj, se la laboruloj samtempe ne havus decidan influon en la Respubliko! Se nin regus kapitalistoj, la laboruloj povus ĉiom ajn peni, kaj ilia situacio ne pliboniĝus. Nia Registaro estas tamen registaro de laboristoj, terkulturistoj kaj ĉiuj laboruloj. Sole dank'al tio alportas la penado de la laboranta popolo tiajn fruktojn.

*La plibonigo de la porvivo estas rezulto de la helpo de Soveta Unio.*

La sekvojn de la misrikolto en la jaro 1947 ni sukcesis venki tiom rapide, ke ĉiu estas surprizita. Ĉu ni estus kapablaj atingi tian sukceson nur per propraj fortoj? Nepre ne. Niaj propraj fortoj ne sufiĉus por tio.

Pri la plibonigo de la porvivo, kiun ni atingis, havas grandegan meriton Soveta Unio. En la jaroj 1947 ĝis 1948, kiam nin minacis nutromanko kaj malsato, Soveta Unio liveris al ni 600.000 tunojn da pangreno. Ankaŭ plue ni importas el Soveta Unio, kompletigante tiel niajn provizojn da greno. Sen tiu ĉi helpo niaj grenejoj hodiaŭ ne estus plenaj, mankus al ni rezervaĵoj, kaj ne estus eble plibonigi la provizadon per la pano. Sen la granda helpo de Soveta Unio ni ne fartus pli bone.

*Ni paŝas antaŭen, dum en la kapitalistaj landoj la situacio de la laboruloj plimalboniĝas.*

Preskaŭ en la sama momento, kiam oni ĉe ni anoncis la senkuponigon de la pano kaj de la faruno, la brita registaro dekretis aferon, kiu plue grade malriĉigos la laborulojn. Laŭ insistado de la usonaj imperialistoj malaltigis la brita registaro la valoron de la valuto (sterlingo) kompare kun la dolaro. Ĝis nun valoris 1 sterlingo 4 dolarojn kaj 3 cendojn, de nun ĝi valoras sole 2 dolarojn kaj 80 cendojn.

Bone sciis aranĝi la aferon la usonaj kapitalistoj. Por la varoj, kiujn ili liveras en Anglion, ili ricevos je triono pli multe ol ĝis nun. Ankaŭ la britaj kapitalistoj akiros per tio pli grandajn enspezojn. Ili konservos la eksterlandajn merkatojn por sia eksporto, ĉar iliaj varoj estos pli malkaraj por la aĉetantoj.

Kaj la brita popolo? Tiu malprofitos per tio, ke varoj importitaj en Anglion estos pli multekostaj. La plialtigo de la panoprezo je unu triono, jen la unua sekvo de la dekreto de l'brita registaro. Ĝis nun kostis la pano en Anglio 4 pencojn, de nun ĝi kostas 6 pencojn. Kial? Ĉar Anglio importas tritikon el Usono, kaj de nun aĉetos ĝin pli kare je unu triono.

Same plialtiĝos ankaŭ la prezoj de la ceteraj bezonaĵoj. Samtempe la salajroj restos memkompreneble neŝanĝitaj, kion diktas la intereso de la britaj kapitalistoj. Plialtigo de vivotenaj kostoj ĉe same altaj salajroj, tio signifas malaltigon de la vivnivelo de laboruloj. Tia estas la evoluo en la kapitalista Anglio. Jam nun tie komenciĝas amasaj strikoj de laboristoj, kiuj sin defendas kontraŭ plimalbonigo de sia vivnivelo.

Same malaltiĝis la valoro de la valuto ankaŭ en aliaj kapitalistaj landoj, kiuj aliĝis al la Marshall-Plano. La valoron de la valuto malaltigis Norvegio, Francio, Italio, Belgio ktp. Kaj ĉie tiu ĉi kapitalista aranĝo signifos pluan malriĉigon de la laboruloj.

Por laboristoj de la tuta mondo ĝi estas nova pruvo, kio estas pli bona, ĉu la kapitalista aŭ la socialisma organizo. *En Britio laŭ insisto de Usono oni la panon plikarigas, dum ĉe ni oni kun helpo de Soveta Unio la panon senkuponigas.* Kapitalismo malriĉigas la laborulojn, dum socialismo ilin levas. Batalo kontraŭ kapitalismo, disvolviĝo de la socialismaj fortoj, jen kia estas la sola elirejo por laboristoj kaj laboruloj en la tuta mondo.

## ĈEĤOSLOVAKA-SOVETA AMIKECO EN LA TEATRO-SFERO

En kadro de la Tagoj de Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco, la Nacia Teatro en Praha prezentis la unuan fojon la sovetan teatraĵon de Rahmanov: „*Senkvieta maljunaĝo*", konatan ĉe ni laŭ la samtema filmo „*Profesoro Poleĵajev*". Rahmanov prilaboris en la verko vere interese efektivajn epizodojn el la vivo de la mondkonata natursciencisto Timirjazev, kiu en aĝo de 75 jaroj ekkomprenis en la tempo de la Rusa Oktobra Revolucio, ke lia loko estas ĉeflanke de tiuj, kiuj faras la revolucion. La teatraĵo estas tiom pli interesa, ke ĝi priskribas rilaton de la intelektuloj al la revolucio. Profesoro Poleĵajev apartenis al malpli juna generacio de progresemaj kleruloj, kiuj konis laŭ propraj spertoj la krudan pugnon de la cara absolutismo kaj simpatiis al la socialista movado. Lia politika opinio ne distingis sin per tiom akraj konturoj, ke li fariĝu aktiva kunlaboranto de la revolucia politika partio. Li dronis en sia scienca laboro, en kiu li atingis tutmondan famon. La plej grava pozitiva flanko de la teatraĵo „*Senkvieta maljunaĝo*" estas, ke ĝi montras al ni konvinke la procezon de spirita disklasigo, kiun kaŭzis la Oktobra Revolucio inter la rusa inteligentularo. La lando baraktis en renversaj revoluciaj okazaĵoj, la bolŝevika partio, gvidata de Lenin kaj Stalin, akiris unuafoje en la homara historio politikan povon kaj, apogante sin sur vastaj laborul-amasoj en la urboj kaj kamparo, ĝi kontraŭbatalis intervenon de fremdaj potencoj kaj kontraŭrevoluciajn ataketojn de la interna reakcio. La adeptoj de nebulaj socialistaj programoj estis forblovitaj per la vento de la historiaj okazaĵoj. Profesoro Poleĵajev estas anime juna kaj avida je justaj revoluciaj novaĵoj. Li superas la fizikajn malfacilojn kaj entuziasmas pro la venka proleta revolucio. Temperamenta sciencisto kun aktiva karaktero ne povas resti flanke en tiaj cirkonstancoj. Li verkas artikolon por la ĵurnalo PRAVDA (La vero), en kiu li sin turnas al la rusa intelektularo, ke ĝi disponigu sin honeste al la soveta registaro kaj kunlaboru kun tiuj, kiuj ne nur paroladas, sed efektive protektas la interesojn de la popolo. Li konfesas sian kredon je la rajto kaj forto de la laborista klaso kaj akceptas plene kaj senrezerve la sentronigon de la kapitalismo. Tiu ĉi publika alvoko de la glora sciencisto kaŭzis skismon inter la rusa intelektularo. Multaj obeis kaj konsciiĝis al si sian devon de progresema homo, kaj aliaj siavice insultis profesoron Poleĵajev kiel „perfidanton". — La serena figuro de prof. Poleĵajev, brava, kuraĝa kaj honesta scienculo kaj pura patrioto, staranta ĉiam tie, kie la popolo lin bezonas, restos por ĉiam granda ekzemplo de reprezentanto de la plej bona parto de l'laborantaj intelektuloj, kiuj bonakceptas la revolucian ekiron kaj volas aktive partopreni ĝin. — Interesa estas en la teatraĵo de Rahmanov la figuro de Maria Lvovna, la edzino de Poleĵajev. Ŝi estas kamarado kaj helpanto de sia edzo. Ŝi plene komprenas la motivojn de lia konduto kaj plene ilin aprobas. Ĉe ŝi oni vidas, kiel ĉiu honesta civitano kaj valora homo estis altirata de la proleta revolucio kvazaŭ per magneto. — Poleĵajev ricevas grandan honoron. La maristoj de la balta ŝiparo, al kiuj li estis preleginta sur iliaj ŝipoj, elektis lin kiel sian deputiton ĉe la leningrada soveto, kaj Lenin montras personan zorgon pri lia sano kaj pri la Botanika Instituto, kiun la maljuna profesoro planas. Lia respondo estas persista laboro, li volas fari sian eblon por la granda epoko, kiun li bonŝance ĝisvivis. Nur la homoj kun granda kaj serena spirito, kiuj trovis sian lokon en revolucio, povas travivi tiom da ekscitiĝo kaj ĝojo kaj venki la fizikan aĝon. La asistanto de Poleĵajev, Vorobjev, havas reakcian mondkoncepton kaj malgraŭ sia junaĝo li iĝas homa ruino, ĵetegita flanken. — La flamo de la Oktobra Revolucio signis la figurojn de la teatraĵo. Iujn ĝi bruldetruas je sensignifa cindro, kaj aliajn ĝi levas al novaj konoj pri profunda homa feliĉo. — Jen teatraĵo rikoltanta je la dua fojo sukcesojn en Praha. La unuan fojon kiel filmo, poste, en la kadro de la Tagoj de Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco, kiel plej sukcesa unua prezentado de la Nacia Teatro en la ĵus pasinta jaro.

## FILMOJ DE USSR EN ĈSR

La Tagoj de Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco kaj la trideka datreveno de l'soveta kinematografio havas grandan interrilaton. Ĉar la soveta filmo estas tute nova filmo, ĝi estas bildo de sia lando, do ĝi estas ĝisfunde realisma, kaj tial ĝi povas esti eĉ profunde nacia. La soveta filmo parolas pri la homo, kiel li kreskas al la nova vivo kaj kiel li estas kreanta ĝin. Ĝi helpas la homojn, por ke ili fariĝu homoj novaj, socialistaj, homoj konstruantaj pli feliĉan vivon. — ĈSR solenis 30 jarojn de l'soveta kino-industrio en ĉiuj siaj kinejoj per sinsekva enkondukado de l'eminentaj verkoj de tiu ĉi socialista kinematografio, akompanante ilin per enkondukaj paroladoj, prelegoj, — estis eldonata riĉa literaturo pri Sovetunio. La ĉehoslovaka kinematografio lernas de la filmo soveta — sed, kompreneble, tio ne signifas, ke ĝi kopias. Ĝi lernas laŭ la granda modelo, kio signifas konscii pri la fonto de ĝia forto, grandeco, nova humaneco kaj krei sur tiu ĉi fundamento novajn fruktojn en la kulturo. — En kio estas la forto, vereco, aktiveco kaj konvinkeco de la soveta filmo? Ĝi estas en tio, ke ĝi partoprenas la taskojn de l'samtempa soveta socio. Ĝi ne parolas vane, ĝi celas al certaj homoj en certa grado de ilia evoluiĝo kaj helpas ilin. La principo de l'soveta filmo estas la soveta realo. Ĝia karakteriza signo estas alta ideeco kaj tendenco. Ĉe tiuj ĉi vortoj kelkloke aŭdiĝas krio, ke temas pri nuligo de l'arta libereco, ke temas pri atako kontraŭ la libereco de la homo entute. Se ne estus la soveta filmo ĝisfunde ideeca kaj tendenca, ne povus ĝiaj verkoj en la tuta mondo mirigi per filmoj, kia estas „Ĉapajev", „Homo numero 217", „Profesoro Poleĵajev", „Krozoŝipo", „Potemkin" kaj multaj aliaj. Estas bone rememorigi al si, ke la sovetaj filmoj en iuj landoj estas malpermesitaj. Kial? Ĉu ili estas malmoralaj, kiel pluraj hollywoodaj filmproduktaĵoj? Ne, ĝuste male. Ili estas ĝisfunde veraj, kaj tial ili povas esti eĉ profunde etikaj. *Ili rakontas pri homoj kaj pri eblecoj, kiujn havas la homoj en la tuta mondo antaŭ si.* Kaj tiu ĉi fakto estas la kaŭzo, ke oni malpermesas iuloke la publikan prezentadon de l'sovetaj filmoj. Ili estas malpermesataj nur pro tio, por ke la popolo ne ekkonu la veron, por ke ĝi estu konfuzita per la burĝa kaj individualista ideologioj, por ke ĝi povu labori ne por si mem, sed nur por tiuj, kiuj volas oportune vivi el ĝia laboro. — La kinematografio, dum ĝi estas en manoj de malbonaj spekulantoj, alportas pli da malbono ol profito, ĉefe pro tio, ke ĝi renversas la amasojn per abomena enhavo de siaj ludoj. *Sed estus memkompreneble, ke, se la kinematografio, estante en la manoj de l'veraj faktoroj de la socialista kulturo, estos unu el la plej fortaj rimedoj por klerigi la masojn.* La cititajn vortojn skribis en la jaro 1914 Vladimir Iljiĉ Lenin. Liaj vortoj fariĝis en la soveta lando realo. La soveta filmo, alnaciiĝita antaŭ 30 jaroj, estas vere unu el la plej potencaj rimedoj por klerigi la popolamasojn. Ĝi kunmarŝas kun ili kaj kondukas ilin post la Granda Oktobra Revolucio. Ĝi kunmarŝis kun ili kaj gvidis ilin post la dua mondmilito ĝis la tagoj de l'venko, ĝi kunmarŝas kun ili kaj kondukas ilin al konstruado de nova socio. *La soveta filmo estas la unua filmo en la mondo, kiu vere turnus sin al milionoj da homoj, kaj milionoj da homoj amas ĝin.* Ĉar la soveta filmo donas multon al la homoj. Ĝi eltrovas kaj montras al ili ĉion plej bonan, kio estas en la homo kaj kion estas necese subteni por la kresko kaj venko dum la batalo por la nova vivo. — La 30a datreveno de l'soveta filmo kun ties eksterordinaraj valoroj por la tuta homaro estis solenata en la nova Ĉehoslovakio tial, ke la vojo de l'soveta lando kaj de ĝia popolo estas vojo de l'progreso, kiu sekure kondukas al la nova mondo de feliĉaj homoj.

## RAPORTO DE MINISTRO D-ro JAROMÍR DOLANSKÝ

Prezidanto de la Ĉs. Ŝtata Ofico por Planado, ministro dro J. Dolanský prezentis en la parlamento de Ĉehoslovaka Respubliko raporton pri plenumo de la unua jaro de l'Kvinjara Plano. Lia raporto, kiu pritraktis detale ankaŭ la rezultojn de la antaŭa Dujara Plano, estis revuo de sukcesoj, mankoj kaj spertoj el la unuaj du kaj duono de jaro de planado en Ĉehoslovakio. La ĉefa celo de la Dujara Plano, t. e. renoviĝo de la ekonomio super la nivelo antaŭmilita, estis atingita, precipe en la industrio. Tio estas sukceso ne nur ekonomia, sed antaŭ ĉio politika, diris Ministro Dolanský, ĉar jam antaŭ Februaro 1948 80% de la tuta industria produktado estis en la publika sektoro. La rapida renoviĝo de la industria produktado signifas do, ke la laborista klaso regas kaj mastrumas pli bone ol la kapitalista.

Pritraktante la ŝanĝojn en la klasa strukturo de la ĉehoslovaka ekonomio, Ministro Dolanský konstatis, ke 97% de la industria produktado en CSR estas publika sektoro.

En la agrokulturo malaperis la grandbienuloj kun terareo pli ol 50 ha kaj komencis evolui pli altaj formoj de terkulturado. La terproduktado, kiu en la Dujara Plano ne plenumis la planon pro misrikolto kaj kapitalista saboto, superplenumis en 1948 la planon en pluraj sektoroj. La ŝanĝo en la potenc- kaj klas-pozicio en la ekonomio ebligis neantaŭviditan ekonomian supreniron. La industria produktado estis en oktobro 1949 je 35% kaj duona procento pli alta ĉe la individuo ol antaŭ la milito. La eksterlanda komerco pligrandiĝis dum la lastaj du jaroj preskaŭ kvaroble kaj la partopreno de Soveta Unio kaj de la popolaj demokratioj atingis 40%.

La ŝtataj financoj konsolidiĝis, la ŝtata enspezo plialtiĝis kaj la cirkulado de banknotoj reduktiĝas.

D-ro Dolanský montris laŭ statistika materialo, ke la vivonivelo en CSR plialtiĝas. Li substrekis sukceson de la ekonomia evoluo en Slovakio, kies industria produktado duobliĝis kompare kun la antaŭmilita.

La rezultoj de la unuaj jaroj de l'ĉs. planita ekonomio montras, diris fine Ministro Dolanský, ke la ĉs. vojo estas ĝusta, ke la socialista ordo estas pli bona ol la kapitalista, kaj li akcentis, ke sen la intima amika rilatado kun Soveta Unio kaj la popolaj demokratioj la vojo de la socialismo estus neebla.

## PRI FILMOJ VIVODONAJ

La glora franca verkisto Henri Barbusse skribis foje, ke la sovetaj filmoj havas netakseblan econ, kiu neniam aperas en la burĝa filmo — nome la donacon de vivo, aŭ de plena vivanteco. Henri Barbusse admirinde celtrafe karakterizis la esencon de la soveta filmarto. — En la mondo oni parolas nuntempe kaj skribas tre multe pri Soveta Unio, kaj ne ĉie favore. La bulvarda gazetaro kaj la radio same ataketas la landojn de popola demokratio. Kiam tiuj landoj alnaciigis siajn kinematografiojn, aŭdiĝis de multaj flankoj, ke tiaĵo povas sekvigi nur malprosperon de la filmarto. Kaj dume en tiuj landoj venis flortempo de la filmokreado, kiu gajnas multsignifajn poziciojn en ĉiu internacia filmofestivalo. Dekadenca estas, kiel videble, la filmarto de la ŝtatoj kapitalistaj. Ne pro tio, ke ĝi ne havus sufiĉe multe da kapablaj artistoj, sed pro tio, ke la filmo estas tie nura komercaĵo, nome des pli avantaĝa artiklo, ju malpli arta ĝi estas. — Oni ie aŭguras malbonan estontecon de Sovetunio kaj de la popolaj demokratioj. Tiu aŭguraĵo estas laŭcela, se oni parolas pri la kapitalistaj ŝtatoj, kie senlaboreco kreskas de tago al tago kaj kie krizo jam estas neevitebla. Tiaĵo ne estas ebla en Sovetunio kaj en la popoldemokratiaj landoj, kie la produktado estas regulata per la konsumado. Tio, kion ni diris koncize ĉi tie, ne estas sensignifa ĉe pritrakto de la soveta filmarto. Ĉar la soveta filmo havas pro tio la admirindan donacon de vivo, ke ĝi naskiĝis en lando, kie vivo kaj eterna kreskado estas la ĉefa signo kaj senco de ĉia strebado. — Nur en tia ĝojoplena kaj forta lando la filmarto povas riĉe disvolvi sin. En tia lando la filmo ne devas stultigi milionnombrajn rigardant-amasojn, por konduki ilin el la senĝoja ĉiutaga realaĵo, la filmo en tia lando devas aŭtentike esprimi ĝis la lasta konsekvenco la ĉiutagajn realaĵojn.

Ĉar ne estas necese vuali la veron, male, necesas montradi ĝin al homoj kiom eble plej multe kaj plej ĝisfunde, por ke oni, ekkoninte ĝin, iru ankoraŭ pli rapide antaŭen al pli bona vivo. La soveta filmo, kies 30an datrevenon en decembro 1949 rememoris la tuta progresema mondo, estas dekomence avangardo de nova vivo. Ĝi ja instigas la rigardantojn, ke ili kreu ĝin. Pri la homo ĝi rakontas kaj transformas ilin. — En la jaro 1950 Sovetunio produktos 40 tutvesperajn filmojn, el kiuj unu duono estos filmoj koloraj. Sovetunio povus produkti tiom da filmoj, kiom da ili oni produktas en Hollywood. Sed Sovetunio produktas artfilmojn, verkojn laŭ la plej bonaj temoj, romanoj, teatraĵoj, kiuj respondas la demandojn de la sovetia homo kaj helpas lin superi ĉiujn malhelpojn en lia vere grandioza verko en la konstruado de la gepatra lando kaj ankaŭ en la transformado de homo mem, por ke li estu pli perfekta. Krom filmoj biografiaj kaj militaj, kiuj resumos la esencon de la granda venko de l'sovetaj armeoj kaj de la soveta popolo en la batalo kontraŭ la faŝismo, oni faros filmojn kun la samtempa problemaro de la soveta realaĵo; kreiĝos ankaŭ kelkaj filmoj, kiuj senmaskigos la nunajn militinstigantojn. Sovetaj filmoverkoj, bazantaj sur realaĵo, celas, ke milionoj da kino-rigardantoj rekonu sin mem, en la filmoj, siajn sukcesojn kaj ankaŭ mankojn, sian hodiaŭon kaj ankaŭ morgaŭon, ke ili forlasu la kinejon kun konoj bezonaj en la ĉiutaga vivo, ke ili sciu, kiel oni povas atingi novajn komunajn sukcesojn. Ion similan neniam konas la rigardanto de la hollywooda filmovaro. Hollywood kreas malharmonion inter la filmo kaj la realaĵo de la homo, la soveta filmo kunigas la homon kun la realaĵo. Pro tio verkisto Henri Barbusse povis nomi ĝin filmo, kiu havas donacon de vivo.

## SUKCESOJ DE L' ĈEĤOSLOVAKA PLANEKONOMIO

Kiel ĉiu popoldemokrata ŝtato, ankaŭ la Ĉehoslovaka Respubliko havas sian planatan ekonomion. La Dujaran Planon (1947—1948) ni plenumis kaj atingis ĝian ĉefan celon, kiu estis la renoviĝo de nia ekonomio al ties antaŭmilita nivelo. En la ĉefa sektoro de nia ekonomio — en industrio — la amplekso de l' produktado estis je 10% pli alta ol antaŭ la milito. Ankaŭ la vivonivelo de l' popolo atingis en la fino de l' Dujara Plano mezkvante la antaŭmilitan nivelon. Le ĉefa signifo de la plenumo al Dujara Plano kuŝas en tio, ke renoviginte nian ekonomion al antaŭmilita nivelo, ni kreis politike ekonomian premison al konstruo de socialismo, al nia unua Kvinjara Ekonomia Plano de l' evoluo de la Respubliko. Post la februara venko super reakcio, la plenumo de l' Dujara Plano estis ankaŭ la elirejo de la granda konstruo-entuziasmo de la popolo, liberiĝo de ĝia krea iniciato, kio precipe montriĝas en la masa evoluo de laborsturmula movado kaj socialista konkurado. La ekonomia leĝo ne plu montriĝas ĉe ni blinde, sendepende al homa volo, kiel demonreganto de kapitalismo, kiel parolas pri tio Frederiko Engels. Pro la fakto, ke pli granda parto de nia ekonomio apartenas al socialista sektoro, kaj la decida parto de l' produktorimedoj estas en la manoj de l' socio, ni povas ekkoni ĉe ni la ekonomian leĝon, kaj surbaze de ĝia kono ni povas ĝin konscie uzi ĉe la socialista konstruado. La politiko de pliakriĝanta klasbatalo montriĝis en ĉiu sektoro de nia ekonomio. En industrio ĝi estas la batalo pri naciigo kaj ties vasteco, pri konfiskaĵoj, pri industriigo al Slovakio. Por konstrui nian pezan industrion, precipe la pezan maŝinindustrion, kiu estas la ĉefa parto de l' Kvinjara Plano, ni bezonas materiajn kaj financajn rimedojn por la socialista akumulado, kaj tion ni disvastigas per la batalo pri raciigo al produktado. En konstruindustrio oni devis batali kontraŭ la kapitalistaj grandarkitekturistoj, kiuj sabotis la planon, kaj nun post la dua etapo de naciigo ni plue batalas tie pri la ŝanĝo de malprogresa metiista produktado al moderna grandproduktado.

En nia vilaĝo ni batalis kontraŭ grandbienisto kaj kampriĉulo, volintaj eluzi la malbonan rikolton en la jaro 1947 kaj venigi nin en malsaton. Hodiaŭ ni daŭrigas nian batalon tie kontraŭ la vilaĝa riĉulo. Al meza kaj etkampisto ni montras la kooperativan vojon al pli alta produktoformo kaj al pli bona vivo. En la eksterlanda komerco ni venkis en la batalo kontraŭ la akaparantaj kapitalistaj im- kaj eksportantoj kaj ni sukcesis orienti nian eksterlandan komercon ĉe ties granda disvastigo al Sovetunio kaj al la landoj kun planekonomio.

En la enlanda komerco ni forigis en la batalo kun la kapitalistaj grandkomercistoj la ne plu daŭrigeblan staton, kiun ni ofte nomis ĝangalo. Ni batalakiris ankaŭ la novan organizon kaj funkcion de nia financsistemo, niaj bankoj fariĝis centra kontorejo kaj kontrolisto de nia produktado kaj komerco kaj nia ŝtata budĝeto koncentriĝas al ni financrimedojn por la socialista konstruado de nia ekonomio. Tiu ĉi ekonomia politiko de la klasa batalo ŝanĝis defundamente la klasan strukturon de nia socio. En la manoj de l' publika sektoro de nia ekonomio estas nun 97% de industria produktado, 93%, de konstruindustrio, preskaŭ 100% de l' regula trafiko de personoj kaj ŝarĝoj, plenaj 100% de bankoj, popolaj monaferoj kaj asekurejoj, plenaj 100% de grandkomerco, en- kaj eksterlanda kaj proksimume 78% de spezo de etkomerco. Tiuj ĉi grandaj sukcesoj de la tri jaroj de nia planekonomio donas al ni firman bazon, sur kiu ni povas ankoraŭ kun pli granda entuziasmo kaj firma memkonfido iri pluen por plenumi la Kvinjaran Planon, por konstrui socialismon, sur la vojo, kiun al niaj nacioj starigis kaj sur kiu gvidas nin la kreanto de niaj planoj kamarado Klement Gottwald.

---

Ĉiujn dezirojn kaj proponojn bonvolu adresi al: „Esperanto-Servo". Praha II, Malá Štěpánská 7, Ĉehoslovakio, telef.: 330-14. Eldonas: Instituto de Esperanto-Servo-Praha. Responda reprezentanto de Esperanto-Servo: A. Malík. Presis: Státní tiskárna (Ŝtata presejo), Praha, Ĉehoslovakio.